B.K. 1957 – teatraĵo – unua premio
Marjorie Boulton - Britio

VAKA SEĜO

Unuakta Tragedio

PERSONOJ:
HELEN GROSSMAN, lernejestrino, 6o-jara
BRENDA KING, instruistino, 45-jara
CHRISTINE POVEY, instruistino, 50-jara
MARION MELLER, instruistino, 30-jara
SHIRLEY DANBY, instruistino, 22-jara
KATHLEEN FORD, instruistino, 35-jara
MARY TOMLINSON, instruistino, 55-jara
MARGARET LANDMAN, lerneja sekretariino, 30-jara

SCENO:

La stabĉambro en *knabina gimnazio. Lerneja blazono kaj granda kalendaro pendas sur la muro; neniaj bildoj, sed granda afiŝtabulo kaj lecionhoraro. Sep lignaj seĝoj troviĝas ĉirkaŭ modere granda tablo. Du malnovaj, malbelaj brakseĝoj ankaŭ troviĝas en la ĉambro. Altaj ŝranketoj kun la nomoj de stabaninoj surskribitaj. (Tiujn ĉi oni povas imagi ekster la scenejo,* se *tiaj ŝranketoj ne estas facile troveblaj.) F-ino KING kaj f-ino* POVEY *interparolas, sidante sur la brakseĝoj. F-ino KING estas inteligenta, sentema virino, simple sed bonguste vestita, en malhelaj vestaĵoj; ŝia mieno estas nervema kaj iom melankolia. F-ino* POVEY, *simple vestita, iomete sed ne farse distriĝema, estas trankvila kaj ĉiam pacigema, konsolema.*

Brenda King: Mi vere ne scias, kiel mi toleros la komencon de tiu ĉi nova trimestro!

Christine Povey: Ne turmentu vin, Brenda; mi certas, ke post kelkaj tagoj vi sentos vin pli bone.

Brenda King: Sed vidi ĉion, kion Sylvia uzis kaj tuŝis antaŭ nur kelkaj semajnoj ... ! Ŝi estis malfeliĉa tie ĉi ... mi scias ....

Christine Pavey: Sed nun ŝi estas feliĉa. Mi certas, Brenda, ke nun ŝi ĝuas pli bonan vivon, la plej belan vivon. Vi scias, Brenda ... mi multe ploris kaj preĝis; sed post la ŝoko kaj la doloro, mi ekkomprenis. Vi povas certi, ke nun ŝi feliĉas, ŝi ege feliĉas; kaj ĉiuj tiuj ĉi stultaj bagateloj estas forgesitaj.

Brenda King: Se nur mi havus vian fidon!

Christine Povey: Sen ĝi mi mem ne povus spiri tie ĉi. (*Leviĝas kaj amike premas la ŝultron de sia amikino.)* Vi komencas kun la duajara grupo, ĉu ne? Mi ĵus kontrolis, kaj viaj libroj estas en la klasĉambro.

Brenda King: Mi dankas vin, Christine. Jes, mi nepre devas iel regi min kaj eklabori.

(F-ino FORD, *ridema, bonhumora, sed esence malkontenta fraŭlino, iam malbonorde vestita, envenas kun f-inoTOMLINSON, malŝike vestita, malsana kaj ĉiam laca, kaj f-ino MELLER, kiu estas ŝike vestita kaj ŝajnas iom malmola, kvazaŭ ciniketa, malfeliĉa sed ne sinkompatema).*

Marion Meller: Saluton, Brenda! saluton, Christine! Mi dezirus al vi feliĉan trimestron, se ni povus iel ajn esperi pri tia miraklo!

Brenda King: Ĉu la nova instruistino alvenis?

Kathleen Ford: Jes; ŝi estas ĉe fraŭlino Landman, kiu klarigas al ŝi diversajn detalojn.

Christine Povey: Kia ŝi estas?

Marion Meller: Timema. *(Iras al sia ŝranko, elprenas ekzercojn, tuj eksidas ĉe la tablo kaj komencas korekti ilin.)*

Christine Povey: Ĉu vi fartas pli bone post la ferio, Mary?

Mary Tomlinson: Ne tre. Mi ne povas bone dormi. Mi devas uzi dormigajn pilolojn. *(BRENDA KING reagas nerveme).* Kaj matene mi havas kapdolorojn. Vere, mi devus eksiĝi; sed mi ne scias, kiel mi vivus inter nun kaj la pensio.

Christine Povey: Vi devos preni bonan tason da varmega teo je la matena interrompo.

(MARGARET LANDMAN, *en nigra, virina kompleto, envenas, kondukante SHIRLEY DANBY. F-ino DANBY estas timema, naiveta, hezitema, inteligenta kaj esence ŝatinda junulino, bone sed kviete vestita. Ŝi portas malgrandajn orelringojn, kaj fianĉinan ringon.)*

Margaret Landman: Jen la nova viktimo, fraŭlino Danby. *(Ĉiuj salutas ŝin.)* Mi jam metis vian nomon super ŝranketo. Bonvolu rigardi la afiŝtabulon kiel eble plej ofte; alie vi nepre malrimarkos ion gravan. Fraŭlino Ford, jen la ŝlosilo de la laboratorio.

Kathleen Ford: Dankon. Ĉu la nova pesilo alvenis?

Margaret Landman: Ankoraŭ ne. Fraŭlino King, la novaj libroj por la biblioteko alvenis, kaj fraŭlino Crossman petas, ke vi ordigu ilin tuj. Fraŭlino Povey, fraŭlino Crossmann diras, ke vi forgesis adicii la registron je la lasta tago de la trimestro.

Christine Povey: Mi pardonpetas; mi atentos tion tuj. *(Eliras kun la sekretariino.)*

Marion Meller: Do! la drakino jam flamspiras. *(Fraŭlinoj KING, TOMLINSON kaj* FORD *serĉas kajerojn kaj librojn.(* Dank' al Dio, ke mi havas liberan horon nun, kvankam tio ne estas aŭguro por la tuta trimestro! Kaj feliĉe por vi ankaŭ, fraŭlino Danby, nia flavbekulino!

Kathleen Ford: Ĉu vi korektas jam, Marion, je la unua tago de nova trimestro?

Marion Meller: Jes, kompreneble! ĉu mi estas, laŭ via interpreto, stabanino kiu

forportus korektendaĵojn por la ferio? Ne, ne; mi devas labori en tiu ĉi drakinejo por gajni mian buterpanon, sed kiam mi ferias ... mi ferias!

(Elektra sonorilo laŭte sonoras.)

Mary Tomlinson: Ho ve, mi ne estas preta! *(Ekforiras rapide, faligas libron, reprenas ĝin, eliras.)*

Kathleen Ford (elirante): Ek al!

Brenda King *(elirante):* Ĝis la!

Marion Meller: Ĉu mi ŝokis vin, fraŭlino Danby?

Shirley Danby: E …

Marion Meller: Jes. Jes, sed vi ne volas vundi min. Antaŭ dek jaroj, mi volis instrui, eduki. Nun mi volas ricevi ĉiumonatan ĉekon kaj atendi decan pension; kaj mi vojaĝas dum la ferioj; kaj dum la ferioj mi ĝuas la vivon.

Shirley Danby: E… . ĉu vi ne satas la profesion?

Marion Miller: Mi kredas, ke plaĉus al mi eduki ... sed tie ĉi mi ne edukas .... kaj la ferioj de instruistino estas sufiĉe longaj por iom kompensi.

Shirley Danby (eksidante ĉe la tablo): Eble mi devas pli zorge prepari miajn lecionojn. *(Komencas labori, kun libro kaj notlibro.)* E ... fraŭlino ... e ....

Marion Meller: Marion Meller .

Shirley Danby: Fraŭlino Meller ... mi scias, ke ne tre decas kritiki dum mia unua tago tie ĉi, sed ... ĉu vi opinias, ke dektrijaraj knabinoj vere ĝuos tiun ĉi libron? *(Montras libron. MARION* MELLER *rapidege trafoliumas kaj poste redonas ĝin.)*

Marion Meller: Ne.

Shirley Danby: Ĉu do ... post kelkaj semajnoj, kompreneble ... mi rajtus proponi alian libron ... ?

Marion Meller: Nekonsilinde! *(CHRISTINE* POVEY *revenas.)* Ŝajnas, ke vi ankoraŭ ne komprenas la Unuan Grandan Leĝon: ke la infanoj ne ĝuu!

Shirley Danby (ŝokite): Ho, fraŭlino Meller! - Sed en la seminario, oni diris al ni . . . .

Marion Meller: Fromaĝo! En la seminario oni havas idealojn; tie ĉi oni havas ... fraŭlinon Crossman, la lernejestrinon!

Christine Povey: Sed ni povos iomete klopodi feliĉigi la knabinojn, Marion.

Marion Meller: Vi estas fakirino, Christine, miraklopova; mi ne. Fraŭlino Danby, ĉu vi konas fraŭlinon Povey? *(Ili salutas unu la alian.)*

Christine Povey: Pardonu min; mi ne volas tro enŝovi mian nazon; sed ĉu mi rajtas peti, ke vi ne sidu en tiu seĝo?

Shirley Danby [tuj leviĝante): Pardonon ... kial ne?

Christine Povey: Mi kredas, ke dum kelkaj tagoj tio kaŭzus doloron al fraŭlino King. Ĝi estis la favorita seĝo de via antaŭulino, Sylvia Redfearn. Ŝi ... ŝi foriris iom tragike, kaj fraŭlino King tre sentis la aferon.

Marion Meller: Plej bone ke ŝi sciu la veron tuj, Christine.

Christine Povey: Eble jes ... Sylvia ne eksiĝis; ŝi subite mortis ... per akcidento.

Shirley Danby: Ho; mi bedaŭras. *(Eksidas sur alia seĝo.)*

Christine Povey: Ŝi ne suferis ... ŝi uzis dormigajn pilolojn,ĉar la nervoj estis malsanaj; kaj unu nokton ŝi erare prenis troan dozon. Fraŭlino King, la kompatindulino, trovis ŝin matene, mortan. Ŝi terure suferis ĉe la postmorta enketo. Ŝi vere tre amis fraŭlinon Redfearn, kiu estis tre inteligenta, sentema ... preskaŭ same juna kiel vi ...

Shirley Danby: Kia tragedio! - Mi dankas vin, ĉar vi sciigis min. Mi estos tre zorgema kun fraŭlino King. Estus terure, reveki tian memoron.

Marion Meller: Oni devas ĉiam esti iom singarda kaj taktoplena kun fraŭlino King. La sezono de la vivo ... vi komprenos, ĉu ne?

Shirley Danby: Jes.

(F-ino TOMLINSON *envenas. Ŝi estas tre pala kaj duonkolapsanta.)*

Christine Povey: Mary! *(Helpas ŝin al braksego.)* Kio estas?

Mary Tomlinson: Ho ve, mi estas malsana. Mi ĵus vomis. La kapo … *(F-ino POVEY flegas ŝin).*

Shirley Danby: Ĉu mi povas helpi?

Marion Meller: Ne, ne; ŝi ofte havas tiajn kapdolorojn. Migrenon[(1).] Mi iros kaj superrigardos ŝian klason. *(Ŝi estas ironta, sed preskaŭ kolizias kun* f-ino *CROSSMAN, la lernejestrino.* F-ino *CROSSMAN estas alta,* iom *impona laŭ aspekto, sed, tre videble, unu el tiuj neŭrozulinoj kies ĉefa plezuro estas humiligi aliajn por senti sin mem potencaj. Acida parolmaniero.)*

Helen Crossman (kiu ne atentas la individuojn): Kiam miaj stabaninoj havas liberan interlecionon, mi atendas ke ili laboru kaj ne babilu. Mi klare aŭdis voĉojn. Fraŭlino Tomlinson, kial vi ne instruas vian klason?

Mary Tomlinson: Mi pardonpetas, fraŭlino Crossman; mi ĵus vomis ... mi ... ho ve!

Marion Meller: Ŝi havas migrenon. Mi iras por superrigardi ŝian klason.

Helen Crossman: Do, rapidu, aŭ la infanoj ekbruos; ne staru kaj gapu! (F-ino MELLER *foriras, grimacante al la dorso de la lernejestrino.)* Fraŭlino Tomlinson, vi vere tro ofte havas tiujn ĉi kapdolorojn. Se vi ne povas normale labori, vi devas eksiĝi.

Christine Povey: Ŝi bonfartos baldaŭ, fraŭlino Crossman.

Helen: Crossman: Baldaŭ tamen ne estas nun. Fraŭlino Danby, mi vidas, ke vi portas orelringojn. Bonvolu ne porti tiajn juvelojn en la lernejo. Ili ne taŭgas en atmosfero de laboro kaj alta moralo.

Shirley Danby (deprenas la orelringojn, vundite sed volante impresi bone): Mi pardonpetas, fraŭlino Crossman; mi ne sciis pri viaj preferoj.

Helen Crossman: Vi scios por la estonteco. Fraŭlino Povey, vi forgesis adicii la registron je la lasta tago de la trimestro. Atentu la malgrandajn detalojn, kaj la

lernejo funkcios glate. Vi perdis mian valoran tempon per tiu malzorgemo.

Christine Povey: Jes, fraŭlino Crossman; mi pardonpetas.

Helen Crossman: Mi iros kaj rigardos kelkajn klasojn. *(*Foriras.)

Shirley Danby: Ho ve!

Christine Povey: Io estas malagrabla en ĉiu posteno, kara mia. Ne permesu, ke tiaj aferoj tro ĉagrenu vin. Kaj ... pardonu min; sed ĉu vi permesas, ke mi donu al vi eĉ alian konsilon?

Shirley Danby: Jes, fraŭlino Povey. Mi vidas, ke tie ĉi mi bezonas multajn konsilojn.

Christine Povey: Vi estas fianĉino, ĉu ne? Mi vidas, ke vi portas fianĉinan ringon.

Shirley Danby: Jes.

Christine Povey: Kara mia, mi tute komprenas, ke vi sentas feliĉon kaj fieron pri tio, sed mi konsilas, ke vi ne permesu al fraŭlino Crossman sciigi pri via fianĉineco,

Shirley Danby: Sed, fraŭlino Povey ..... !

Christine Povey: Mi scias. Mi scias. Sed tie ĉi .... fraŭlino Crossman estas tre malfeliĉa virino … ni devas preĝi por ŝi, kaj laŭ niaj kapabloj paciencadi… ŝi estas ege malfeliĉa, kaj la feliĉo de aliaj dolorigas ŝin, eĉ kvazaŭ…ofendas ŝin. Pardonu min.

Shirley Danby: Ho ve!

Christine Povey (dezirante konsoli ŝin): Ĉu vi esperas edziniĝi baldaŭ?

Shirley Danby (pli gaie): Post du jaroj. Ankaŭ Peter estas instruisto. Ni ambaŭ tre amas infanojn. Ni esperas, ke post kelkaj jaroj ni mem povos havi familion ... Mi havas portreton de Peter en la mansako; ĉu vi volas vidi ĝin!

Christine Povey: Jes, dankon. *(F-ino DANBY montras al ŝi portreton.)* Jes, via fianĉo aspektas tre sincera, bonkora junulo ... jes, mi ŝatas tiun senvualan, simplan vizaĝon. *(Redonas la portreton.)* Mi dankas vin.

Mary Tomlinson: Eble mi nun devas reiri al mia klaso.

Christine Povey: Ne valoras la penon; la sonorilo sonoros post momento; kaj vere, vi ne taŭgas por instrui. Mi vidas, ke vi tre suferas.

Mary Tomlinson: Jes, sed mi devos esti forta. *(Eklarmante senbrue.)* Mi ne povas perdi la postenon. Mi ne scias, kion mi faros sen salajro.

Christine Povey: Ne timu, Mary.

(La elektra sonorilo sonoras denove.)

Shirley Danby (leviĝante): Ĉu vi afable montros al mi, kie troviĝas la kvarjara klaso B?

*Christine Povey (leviĝante):*Jes, volonte. Mary, kiu klaso estos nun la via?

Mary Tomlinson: La triajara A.

(Fraŭlino FORD, MELLER *kaj KING envenas. F-ino FORD formetas kajeron kaj prenas du librojn. F-ino* MELLER *rearanĝas la ekzercojn, kiujn ŝi volis korekti, metas ilin denove* en *sian ŝranketon kaj prenas kajeron. Dume, f-ino KING formetas librojn kaj prenas mapon. F-ino* MELLER *faligas sian kajeron kaj paperpeco elfalas.)*

Kahtleen Ford (redonante la kajeron): Buterfingrulino! - Kio estas tio?? *(Laŭtlegas.)* Ses botelojn da glukoza[2] limonado, du sifonojn da sodakvo! Vi devos esti pli singarda, Marion; vi baldaŭ iĝos ebriulino!

Marion Meller: Kiam mi havis stomakinflamon.

Kathleen Ford: Hm; tie ĉi oni bezonas viskion.

Marion Meller: Ĉu vi fartas pli bone, Mary?

Mary Tomlinson: Iomete.

(Fraŭlino CROSSMAN denove envenas.)

Helen Crossman: Kiam la sonorilo estas sonorinta, mi atendas, ke ĉiuj miaj stabaninoj iru tuj al siaj klasoj; kaj tuj signifas tuj, ne post kvinminuta babilado. *(Ŝi subite rimarkas la ringon de f~ino DANBY.)* Fraŭlino Danby, mi kredis, ke mi ordonis al vi demeti viajn juvelojn.

Shirley Danby (timeme ektuŝante siajn orelojn): Jes, fraŭlino Crossman; mi jam demetis ilin.

Helen Crossman: Kaj kio estas tiu brilanta ringo sur via maldekstra mano?

Christine Povey: Fraŭlino Danby intencis tuj demeti ĝin, fraŭlino Crossman.

Shirley Danby: Sed ... sed, fraŭlino Crossman, tio ne estas juvelo ... almenaŭ ĝi ne estas ornamaĵo; aŭ mi ne portas ĝin kiel ornamaĵon; tio estas mia fianĉina ringo.

Helen Crossman (preskaŭ elkraĉante la vortojn): Via fianĉina ringo! Neniu ajn el miaj stabaninoj portos fianĉinan ringon en la lernejo! Demetu ĝin tuj! Mi ne toleros tian ekzemplon inter miaj knabinoj!

Shirley Danby: Sed, fraŭlino Crossman, tio ne estas afero de ornamado, de vanteco ... tio estas simbolo ... io al mi tre sankta . . .

Marion Meller (averteme): Ĉit, ĉit! [3]

Mary Tomlinson (mallaŭte): Ho ve!

Helen Crossman: Vi estas tie ĉi por instrui, ne por revi pri via knabamiko.

Shirley Danby: Sed, vere, fraŭlino Crossman, mi nun laboras pli bone pro li. Kiam mi estas tentata al iu maldiligenteco aŭ malpacienco, mi pensas pri mia fianĉo, kaj mi tuj ...

Helen Crossman; Aŭskultu, fraŭlino Danby! Dum la semajnfino vi kaj tiu via knabamiko povas stultaĵi kaj amaĵi private laŭdezire ....

Shirley Danby (indigne): Sed ...

Helen Crossman: ... sed en la lernejo vi ne portos tiun ringon. La knabinoj estas jam sufiĉe stultaj kaj sentimentalaj, sen via helpo.

(F-ino *DANBY, ĝiskore vundite, surprizita kaj senaplombigita, eklarmas kaj, palpante, eksidas sur la tabua seĝo.)*

Brenda King (histeriete): Ŝi sidas en la seĝo de Sylvia Redfearn!

Shirley Danby (larmante pli forte): Pardonu min! *(Ŝi volas leviĝi;* f-ino *POVEY amike premas ŝian ŝultron.)*

Brenda King: Ne, ne, knabino; sidu kie ajn vi volas.

Helen Crossman (sarkasme): Eĉ dum la lernejestrino staras.

Brenda King: Ĉu vi intencas, ke ŝi iru laŭ la vojo de Sylvia Redfearn?

Christine Povey: Brenda, Brenda…

Helen Grossman: Fraŭlino King, regu vin. Iru tuj al via klaso. Fraŭlino Danby, vi ne komencas tre bone. Fraŭlino Meller, kial vi atendas? Iru al via klaso.

Marion Meller: Diablo, ĉu vi ne havas pli da homa komprenemo ol napo?

Christine Povey: Marion!

Helen Crossman: Vi pardonpetos pro tio, fraŭlino Meller. Estas krime paroli tiel al la lernejestrino, precipe antaŭ aliaj stabaninoj!

Brenda King (pseŭdotrankvile): Krime ... ĉu vi volas sciigi pri vera krimo? Mi kredas, ke la sola krimulino tie ĉi estas mi.

Helen Crossman: Vi histerias! Kia komenco al la trimestro!

Brenda King: Ne, mi ne histerias; mi ne troigas. Estas ja krime, ĉu ne, malvere atesti?

Christine Povey (kiu ekkomprenas): Brenda! Ĉit! Fraŭlino Crossman ....

Brenda King: Estas ja krime, ĉu ne, ĵurorompi ĉe postmorta enketo kaj kasi la veron?

Helen Crossman: Kion vi diras?

Brenda King: Mi kaŝis la veron por eviti multan malbonon; por helpi sinjorinon Redfearn ... por ke la reputacio de la lernejo ne suferu ... por ke vi mem ne suferu, fraŭlino Crossman . . . sed kiam fraŭlino Danby eklarmis en la seĝo de Sylvia, mi ekkomprenis devon al la vivantoj!

Christine Povey: Brenda ...

Brenda King: Sylvia Redfearn ne mortis per akcidento. Sylvia Redfearn intence mortigis sin mem.

Christine Povey: Ne, ne!

Helen Crossman: Vi nur imagas misterojn! Vi volas krei skandalon!

Brenda King: Mi povas montri al vi la pruvon. *(Prenas leteron el sia mansako kaj montras la koverton al ĉiuj.)*

Kathleen Ford: Ho, la manskribo de Sylvia! *(Ekploras.)*

Brenda King: Kiam mi iris por serĉi ŝin tiun matenon, mi trovis ŝin ... kaj mi trovis leteron sur la noktotablo. Mi legis ĝin ... dufoje . . . trifoje . . . kiom da fojoj mi ne scias ... mi devis rapide decidi; kaj mi decidis, ke mi forprenos la leteron kaj silentos ... oni verdiktu pri akcidento. Nun mi legos la leteron al vi.

Helen Crossman: Vi ne legos tiun leteron! Mi malpermesas! Iru al via klaso tuj!

Marion Meller: Tio ĉi ne estas plu afero de horaroj kaj laborkontraktoj! Silentu! Ni rajtas aŭdi la lastajn vortojn de kompatinda Sylvia!

Helen Crossman: Vi ne restos tie ĉi nun, nepre ne, fraŭlino Meller!

Marion Meller: Ĉu vi kredas, ke mi volas resti tie ĉi? Legu la leteron, Brenda!

(Fraŭlino Crossman, sentante ke pli forta potenco senpotencigas ŝin, eksidas, furioza kaj timema.)

Brenda King: Mi ruinigis min por savi la reputacion de la lernejo. Eble mi devos iri en karceron nun pro ĵurorompo; kiu scias?

Christine Povey: Mi kredas, ke en tia kazo oni montros homan kompaton ... eble nur monpunos. Brenda, legu la leteron; la vero estos pli bona ol multaj teruraj konjektoj.

Brenda King (laŭtlegante): "Kara Brenda, pardonu min. Eble mi nun agas tre malkuraĝe, sed vere mi ne povas toleradi plu. *(Fraŭlino* FORD *denove ekploras. Ĉiuj estas konsternitaj; fraŭlino DANBY estas kvazaŭ paralizita pro teruro, aŭdante sian antaŭulinon.)* Mi ne vidas elirvojon. Mi plurfoje diris al fraŭlino Crossman, ke mi volas serĉi alian postenon, kaj ŝi ĉiam respondis, ke mi faru laŭ inklino, sed la profesia konscienco ne permesos, ke ŝi donu al mi bonan rekomendon."

Marion Meller (*histerie al f-ino CROSSMAN*): Murdistino! (*F-ino CROSSMAN volas respondi, sed ne trovas vortojn).*

Brenda King: "Mi scias, ke mi malkompetentas; sed tio ne estas, kara Brenda, ĉar mi ne volas labori. Mi ne povas plaĉi al fraŭlino Crossman. Marion tre volas helpi min, (*MARION MELLER ekploras*) kaj konsilas min iĝi indiferenta al mia laboro. Sed mi vidas la okulojn de la knabinoj, tiujn fenestrojn el kiuj rigardas malsataj spiritoj… ho ve, ankaŭ spiritoj ribelemaj, ĝis ili ne povas instruiĝi, aŭ timpremitaj, ĝis ili ne kuraĝas labori. Mi sentis, ke mi devas se eble fari ion por ili. Mi ankoraŭ kredas, ke oni povas eduki per amo, en feliĉa atmosfero, sen timo, sen deviga enuo; vere mi kredas tion, Brenda, kaj… kaj… (*F-ino KING preskaŭ ekploras, sed post momento regas sin.*)… kaj ankoraŭ en tiu fido mi mortos. Mi mem tre kulpas; mi estas nesperta, tro juna, eble naiva; mi havas fidon en la koro, sed mi jam vidas, ke mi ne komprenas taktikon. Salutu por mi ĉiujn, kiuj volis helpi min: Marion, kies konsilojn mi ne kapablis sekvi; Christine, kies religieman rezignacion mi ne povas imiti; (*F-ino POVEY ekploras*) Kathleen, kiu ofte klopodis ridigi min por konsoli min; kaj Mary, kiu ofte, kiam ŝi mem suferigis pro sia migreno, ankoraŭ havis simpatian vorton por mi." (*F-ino TOMLINSON ekploregas. F-ino KING daŭrigas, iomete amare*). Kaj ĉu vi kredas, ke mi ne volas plori, relegante tiujn ĉi vortojn? Sed mi devas ne plori nun; mi devas batali, riski, eble perdi ĉion… por ke alia honesta junulino ne iru laŭ sama malluma vojo kaj tria novulino ne eksidu en la seĝo de Sylvia Redfearn! Kaj vi, turmentistino, vi, diktatorino, ŝtonkora, englutu nun vian mediklamenton!

Helen Crossman (anhelante): Kiel vi aŭdacas ... kiel vi aŭdacas ...?.

Brenda King: Mi finlegos tiun ĉi leteron, aŭ mi krevos pro doloro kaj kolero! *(Laŭtlegas.)* "Salutu ilin ĉiujn; kaj prenu kison por vi mem, ĉar vi tiom volis helpi min, vi estis tiel bona por mi." - Malvere; mi faris nenion; mi malsukcesis. "Sed nun mi ne povas plu. Tiom da mensa konflikto malebligas al mi dormi. Mi volis esti instruistino, kaj tie ĉi mi devas esti vokto inter timregataj sklavinetoj, kaj sklavino mem. Oni pardonu min; mi luktis, sed mi estas laca, lacega, tiom laca; kaj nun mi prenos multajn pilolojn kaj dormos ĉiam. Adiaŭ, Brenda! Via mizera, mizera, mizerega amikino, Sylvia."

(*Momento de silento sekvas.)*

Mary Tomlinson: Ŝi pravas ... sklavinoj ... ho ve! *(Svenas. La aliaj ne atentas ŝin.)*

Marion Meller: Murdistino!

Brenda King: Kaj nun mi iros laŭ mia propra vojo… al la mort-enketisto, por konfesi mian krimon.

Helen Crossman: Vi iros rekte en karceron!

Brenda King (trankvile): Tiu ĉi lernejo jam estas karcero.

Helen Crossman: Vi ne forportos tiun ĉi leteron! Donu ĝin al mi! Mi detruos ĝin! *(Ŝi provas mankapti la leteron.* F-ino *KING savas ĝin.*)

Brenda King: Do, nun ankaŭ vi sentas krimemon, ĉu? Eble plej bone ke mi iru tuj!

Helen Crossman: Mi ordonas al vi, iru al via klaso! Kontraktorompo!

Brenda King: Mi estas jam ruinigita. Adiaŭ! *(Eliras kun la letero. F~ino CROSSMAN volas sekvi ŝin, sed f-inoj* FORD *kaj* MELLER *tenas ŝin, ĝis pordofermo aŭdiĝas.)*

Helen Crossman: Mi faros … ho, mi faros ion teruran ... mi ne scias kion mi faros *(subite perdante la fortojn)* ... mi estas tre mizera maljunulino ... neniu ajn amas min ... mi gravas al neniu ajn ... *(Foriras, stumble.)*

Christine Povey: Ho Dio, kompatu Viajn infanojn kaj la malsanajn animojn!

(*MARION MELLER metas la manojn amike sur la ŝultrojn* de *f-ino DANBY.)*

Marion Meller: Jen konsilo, kara mia. Foriru. Foriru tuj. Post tia skandalo oni komprenos kaj akceptos vian eksiĝon. Rekomencu ie alie. Multaj bonaj lemejoj troviĝas en nia lando ... multegaj. Sed se vi restos en infero de falseco kaj tiraneco, vi iĝos apatia kaj cinika ... aŭ via seĝo vakos ... baldaŭ ....

Shirley Danby: Ĉu vi venos kun mi?

Marion Meller: Mi? Ne, ne: mi estas jam ŝtoniĝinta, brutiĝinta, perdita.

Shirley Danby: Ne. Vi simpatias kun aliaj. Ĉio bona en vi restas, nur dormas.

Marion Meller: Kara bona naivulino! *(Subite ŝia vizaĝo eklumetas.)* Sed ... vi pravas. Jes, mi venos kun vi ... ni serĉos lernejon, kie malfeliĉulino ne konsolas sin, malfeliĉigante aliajn ... ni ... fraŭlino Danby, ni edukos! kaj mi eble retrovos mian animon!

Christine Povey: Dume, ni provu trankviligi la knabinojn. (*Kiam ŝi eliras, krio aŭdiĝas; f-ino POVEY revenas; f-ino LANDMAN kuras en la ĉambron*).

Margaret Landman: Fraŭlino Ford! Venu al la laboratorio tuj! Fraŭlino Crossman…!

(*Ĉiuj leviĝas, konsternite, escepte de f-ino TOMLINSON*).

Al la laboratorio, tuj!

Kurtenfalo

(1) Migreno: perioda, tre forta kapdoloro
(2) glukozo: sukera substanco vinbera.
(3) ĉit: interjekcio silentiga.

Jam publikigita en *Virino ĉe la landlimo*, eldonejo Koko, 1959